

# SCIENCA REVUO

Vol. 14  
N-ro 1/2  
(53/54)  
29. 2. 1964.

**Redakta komitato:** D-ro A. Albault, M. Ĝivoje, Prof. J. Görlich, D-ro P. Neergaard, Prof. B. Popović, Prof. S. Reiersöl, C. Stop-Bowitz.  
**Cedfredaktoro:** M. Ĝivoje, Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavio.  
**Respodenca redaktoro** (Odgovorni urednik): Prof. B. Popović, Zagrebačka 24, Sarajevo, Jugoslavio.

Ĉi tiun volumon redaktis Prof. B. Popović  
(Lingva kontrolo de Doc. M. Ŝapojnić, Beograd)

## ENHAVO:

	paĝo
<b>D-ro A. Albault:</b> Esperantaj simoboloj por lingvoj . . . . .	3
<b>Lingvaj diskutoj</b> (R. Linse: Finajo de predikativa adjektivo; A. Lienharadt: Por facile kompreni fakterminojn; R. Haferkorn: Esprimado de kvantoj, nombraj kaj mezuraj indikoj . . . . .	13
<b>Eskil Svane:</b> Farado de kontraktoj . . . . .	15
<b>P. Moore (trad. T. Bluett):</b> Plutono . . . . .	29
<b>D-ro W. J. Nijveld:</b> Protektado de fero per farbo . . . . .	35
<b>G. Nilsson:</b> Pri la uzo de oksalhidrazido . . . . .	45
<b>D-ro S. Cañotin:</b> Pri la metodo de la mikroradiopiko . . . . .	54
<b>C. Stop — Bowitz:</b> La eŭropa angilo tute ne frajas . . . . .	56
<b>J. M. Mabeoone:</b> Sedimentologio . . . . .	65
<b>R. Haferkorn:</b> El la fakoj . . . . .	72

42/49 : 003.62

41/49 : 003.62

## ESPERANTAJ SIMBOLOJ POR LINGVOJ

(de D-ro Andreo ALBAULT)

Post la studo de WÜSTER («La internaciaj simboloj por lingvoj», SCIENCAJ STUDIOJ, p. 47), ŝajne estis nenio plu por aldiri al tiu problemo: oni simple atendu la decidojn de altaj instancoj!

Tamen evidentiĝas el la artikolo mem de WÜSTER, ke la esperantistoj, unuaj kaj solaj aŭ preskaŭ, uzis dum pli ol 40 jaroj propran sistemon. Vortaroj kiel ekzemple tiu de WARINGHIEN (*Grand Dictionnaire Espéranto-Français*) eĉ notas la signifon de simboloj, kiaj A, F, G, H, L, P, R, ktp.

Altaj instancoj ignoris tiun ekzistantan sistemon, same kiel ili ignoris Esperanton. (Aŭ ĉu eble ni ne sciis nin trudi?) Ĉu ili nun trudos al ni tute novan sistemon, post ilia ĵusa eksento, ekkontakto de la bezono?

Eldono de INTERNACIA SCIENCA ASOCIO ESPERANTISTA (jugoslavia filio). Aperas kvarfoje jare. Jarabono 30 steloj = 7,5 Ned.gld. = 2,2 dol. = 1500 Din. — Por membroj de I. S. A. E. la jarabono 25 steloj (la jarkozito 10 steloj).

La abonojn kolektas la landaj delegitoj de ISAE  
(La listo troviĝas sur la lasta kovrilpaĝo)

Izdavaĉ: Nauĉna sekcija Saveza Esperantista Jugoslavije (Jugoslavena podružnica Meĉunarodnog nauĉnog društva) — Terazije 42, Beograd.  
— Za izdavaĉa odgoverni urednik: Prof. B. Popović, Zagrebačka 24, Sarajevo. — Ŝtampano u NIP »Štampa« — Osijek. Za ŝtampariju: A. Lang.



Kompreneble, se ni estus certaj pri tute taŭga kaj plena sistemo, ni eble povus pridubi la neceson defendi esperantan sistemon. Sed la aferoj ŝajne estas aliaj. Oni ja legas ekz-e ke la rumana delegito »kontentiĝis per dulitera signo... lasante la signon R... al la rusa lingvo«. Ne voĉdonantaj delegitoj povos establi homogenan sistemon ne pli ol komisiono poemojn. Ŝajne kaj krome estas pli bone establi tian sistemon sur konkreta lingvo, kia Esperanto, ol sur la »internaciaj formoj«, nocio iom abstrakta finfine, kaj laŭ la decidoj de delegitoj, kiuj ofte voĉdonos pli pro sentimentaleco, ol pro la taŭgeco de la sistemo.

Ni mem starigu sistemon Esperantan, kiu estu la plilarĝigo de la sistemo jam enradikiĝinta en niaj kutimoj dum 50 jaroj. Se, poste, altaj instancoj akceptos nian sistemon, des pli bone. Tio estos ankaŭ speco de rekono al nia movado kaj saluto al simbolsistemoj jam tradicia kaj plene taŭga.

Antaŭ kelkaj jaroj, por etimologia laboro, mi starigis tian pli plenan sistemon kaj daŭre ĝin praktike uzas. Mi eĉ pensis pri la publikigo. La studo de WÜSTER ŝancelis mian decidon; mi prokrastis. Sed kial ni hontu pri la Esperanta solvo? Ni male proponu ĝin!! Finfine, do, la studo de WÜSTER nerekte instigis min kompletigi mian sistemon: pli vasta ol miaj nuraj bezonoj neprigis, ĝi nun estas pli »universala« kaj certe povos esti uzata en multaj cirkonstancoj, precipe nun, kiam la novaj neokcidentaj landoj pli patroprenos en la kultura agado tutmonda.

Por kompletigi mian sistemon, mian proponon al la Esperanto-movado, mi uzis la artikolon de S. CULBERT (Sc. R. 9 p. 80-83), kiu listigas »la plej multe parolatajn lingvojn«. Al tiuj mi aldonis kelkajn antikvajn aŭ modernajn lingvojn gravajn pro diversaj kialoj. Kiel eble plej klopodis krei unuliteran simbolon por la pli gravaj lingvoj: pralingvoj kaj plej multe parolataj modernaj. Por la malnovgreka aŭ helena, mi proponas alternative HI aŭ E (preteratento de la greka »spirito«): Esperanto povas uzi la simbolon Eo, simpligo de la vaste uzata E-o. Eble necesus aldoni la slovenan S, tiam la sanskrita povus iĝi Ss: mi pretendas nek kompletecon, nek finitecon.

Por elekti la duan literon mi procedis jene: mi klopodis nomi en la sama tempo ĉiujn, kiuj havas saman inicialon kaj por ĉiu el ili mi elektis la plej tipan literon, preferante konsonantojn kaj konsiderante unue la plej multe parolatajn lingvojn. Se temas pri (etimologia) kunmetaĵo, la inicialoj de la vortpartoj, se iel eble, estas la plej trafaj: blankrusa: Br; nederlanda: Nl. Estas bone, atenti la nacilingvan nomon: norvega Ng pro »NORGE« (ne: Nv), same blankrusa kaj »bjelorusa« proponas Br; — aŭ parenca nomon: malgaŝa apud Madagaskaro incitas uzi Mg. En la kazo de la serio: gaela, galica, galla, galaa la karakterizaj duaj literoj preskaŭ devige estas: e, i, l, a. Romanĉa, romanika kaj rumana apud rusa (R) kondukas al prefero de Rĉ, Rk kaj Rn, en kiu oni konsideras la las-

tan konsonaton: elekto de ekz-e Rm por - - - unu el la tri, devigus tion en la memoro, dum apud Rĉ kaj Rk povas nomi nur la Rumanan.

Du el la plej supraj rimarkoj trudas Oc por okcitana (aŭ »lingvo de OC«). La simboloj povas distingi ekz-e ĉeĥan Ĉĥ kaj slovakon Sk, nederlandan Nl kaj Flandran Fl.....; se necese Ĉs povus signifi ĉeĥo-slovakon ktp...

Precipe la listo jam starigita entenas ĉiun iom gravan lingvon. Aliaj lingvoj estu prefere indikitaj per la plena nomo, aŭ se necese per trilitera simbolo. Se tamen montriĝus, ke iu pli grava lingvo mankas, oni donu al ĝi duliteran simbolon, atentante la jam ekzistantajn simbolojn.

En ĉi tiu listo mi provis esperantigi kelkajn pliajn lingvonomojn, ĝis nun ne asimilitajn, aŭ proponi kelkajn laŭ mi pli bonajn formojn: ekz-e »maleza« ŝajnas pli bona ol »malaja« pro la derivaĵoj (»Malezio« aŭ »Malezujo« pli taŭgas ol la misharmonia »Malajio« aŭ la »neeblo« »Malajujo«). Mi ne arogis esperantigi ĉion: fakuloj diskutu kaj decidu.

Kelkaj lingvoj havas du nomojn inter kiuj oni povas heziti: provizore ankaŭ la simboloj estas duoblaj. Fine estas atentita la problemo de la esperantaj supersignoj: alternativo estas montrita inter parentezoj por la kazo, se ni volus ne uzi supersignojn. Laŭ eblo, la sistemo estas tiel starigita, ke sufiĉas simple forigi ilin. Tiam la sistemo estas uzebla ankaŭ de neesperantistoj. Sed mi konsilas uzi la sistemon kun la supersignoj: se ni fidus pri la venko de nia lingvo, ni povas fidi ankaŭ, ke taŭga sistemo konstruita laŭ tiu propono estos vaste uzata.

Sekvas du tabeloj. La unua listigas la lingvojn laŭ ilia parolateco (esprimita en milionoj da parolantoj) kaj arigas ilin laŭ 7 empiriaj grupoj de 14 ĝis 25 lingvoj. Estas interese noti ka la plej multe parolataj 14 lingvoj estas la esprimiloj de 1829 milionoj da homoj, t. e. de iom pli ol la duono de la homaro (vidu ankaŭ A. ALBAULT »Interlingvistika Informa Servo« No 4, Julio 1958, p. 14). Preskaŭ ĉiuj lingvoj de la unua grupo havas unuliteran simbolon.

La dua listo estas alfabeto listo laŭ la lingvonomoj: ĝi aldonas diversajn detalojn.

## A. LINGVOLISTO LAU PAROLATECO

### I — ANTIKVAJ LINGVOJ

L	LATINA	Pk	PRAKRITA
HI/E	HELENA (aŭ: 'E)	V	VEDA
Hb	HEBREA	Rk	ROMANIKA
Eŭ	EUROPA	Kl	KELTA
He	HINDO-eŭropa	G	GERMANA
En	ENGLO-SAKSA	Gl	GALLA (prafrancia)
S	SANSKRITA	Gt	GOTA



## II — NUNTEMPAJ LINGVOJ

<b>1<sup>o</sup> — 50 milionoj aŭ pli</b>		14 lingvoj	(1829 milionoj)
Ĉ	ĈINA	432	B BENGALA 77
A	ANGLA	275	Ab ARABA 74
R	RUSA	153	P PORTUGALA 72
Hd	HINDA	146	F FRANCA 70
H	HISPANA	139	M MALEZA 69
G	GERMANA	120	I ITALA 57
J	JAPANA	95	U URDUA 50
<b>2<sup>o</sup> — inter 20 kaj 50 milionoj</b>		16 lingvoj	(488 milionoj)
K	KANTONA	43	Ko KOREA 32
Jv	JAVA	42	Ml MALAJALAMA 31
Uk	UKRAJNA	40	Mr MARATHI 31
ŭu	ŭu/W	39	An ANAMA 23
T	TELUGU	38	Pb PUNĜABA 23
Mi	MIN	36	Tk TURKA 23
Tm	TAMILA	34	Gz GUZERTA 20
Pl	POLA	33	Ps PERSA 20
<b>3<sup>o</sup> — inter 10 kaj 20 milionoj</b>		15 lingvoj	(220 milionoj)
Hk	HAKKA	19	Or ORIJA 14
Kn	KANARA	19	Hs HAUSA 13
Sm	SIAMA	19	Sd SUNDA 13
Nl	NEDERLANDA	17	Hg HUNGARA 12
Rn	RUMANA	17	Ag AFGANA 11
Rs	RAJASTHANI	16	Br BLANKRUSA 10
Sb—Kr	SERBA-KROATA	16	Sh SUAHILA 10
Bm	BIRMA	14	
<b>4<sup>o</sup> — inter 5 kaj 10 milionoj</b>		21 lingvoj	(148 milionoj)
Ĉh	ĉEĤA	9	Fu FULANI 6
Oc	OKCITANA	9	Kĉ KIĈUA 6
Sv	SVEDA	9	Md MADURA 6
Gr/nHl	GREKA (moderna)	8	Ra RUANDA 6
Tg	TAGALA	8	Az AZERBAJĜANA 5
Vs	VISAJA	8	Dn DANA 5
As	ASAMA	7	Jd JIDA 5
Bl	BULGARA	7	Kt KATALUNA 5
Cl/Sa	CEJLONA	7	Kd KURDA 5
Tb	TIBETA	7	Si SINDHI 5
Uz	UZBEKA	7	
<b>5<sup>o</sup> — inter 3 kaj 5 milionoj</b>		21 lingvoj	(69 milionoj)
Ak	AFRIKANSANA	4	Ka KHERUARI 3
Am	ARMENA		Li LITOVA
Ba	BALIA		Mb MALINKE...

Ib	IGBO	Np	NEPALA
Jb	JORUBA	Sk	SLOVAKA
Kk	KAJZAKA	Sl	SOMALA
Mg	MALGAŜA	Tt	TATARA
Ng	NORVEGA	Ug	UIGHUR
Su/Fn	SUOMA	Xh	XHOSA
Ga	GALAA	3	Zl ZULUA
Kg	KAMBOĜA	3	
<b>6<sup>o</sup> — inter 2 kaj 3 milionoj</b>		14 lingvoj	(28 milionoj)
Al	ALBANA	Ks	KAŜMIRA
Bh	BALUHA	La	LATVA
Gi	GALICA	Ms	MOSSI
Ld	LUGANDA	Rd	RUNDI
Gv	GVARANA	Sn	SLOVENA
nHb	HEBREA	Tf	TUI—FANTE
I	ILOKO	Ub	UMBUNDU
<b>7<sup>o</sup> — inter 1 kaj 2 milionoj</b>		25 lingvoj	
Bs	BAŜKIRA	Kz	KIRGIZA
Bt	BATAKA	Ls	LAOSA
Bg	BUGIA	Li	LINGALA
Cv	ĈUVAŜA	Mn	MAKEDONA
Dk	DAJAKA	Mu	MAKUA
E/Eo	ESPERANTA	Mv	MORDOVA
Et	ESTONA	Nj	NJANĜA
Ev	EVEA	nSo	SOTHO NORDA
Go	GONDA	sSo	SOTHO SUDA
Ie	IBIBIO-EFIK	Tj	TAĴIKI
Kv	KARTVELA	Tl	TULU
Ku	KIKUJU	Tn	TURKOMANA
Kb	KIMBUNDU		
<b>8<sup>o</sup> — Kelkaj aliaj lingvoj</b>			
Bb	BERBERA	Kr	KROATA
Fl	FLANDRA	Rĉ	ROMANĈA
Ge	GAELA	Sb	SERBA
Is	ISLANDA	St	SKOTA
Ir	IRLANDA	Vk	VASKA
Km	KIMRA		

## III — ALIAJ MALLONGIGOJ

b = basa	ekz. : bL	= baslatina
p = popola	ekz. : pL	= popollatina
m = malnova	ekz. : mF	= malnovfranca
a = alta	ekz. : maG	= malnova altgermana
n = nova	ekz. : nHl	= novhelena



B. ALFABETA LINGVOLISTO

A <sub>b</sub>	11	AFGANA
Ak	4	AFRIKANSA
Al	2	ALBANA
Ah	8	AMHARA (Etiopio)
An	23	ANAMA
T	38	ANDHRA = Telugu
A	275	ANGLA
Ab	74	ARABA
Am	4	ARMENA
As	7	ASAMA (Hindio)
Az	5	AZERBAJĜANA (Sovetunio, Irano)
Ba	4	BALIA (Indonezio)
B <sup>h</sup> (/Bh)	2	BALUHA (Irano, Pakistano)
Vk	—	BASKA = Vaska
B <sup>ŝ</sup> (/Bs)	1	BAŜKIRA (Sovetunio)
Bt	1	BATAKA (Indonezio)
B	77	BENGALA
Bb	—	BERBERA (Norda Afr.)
Bm	14	BIRMA
Br	10	BLANKRUSA
Bg	1	BUGIA (Indonezio)
Bl	7	BULGARA
Cl/Sa	7	CEJLONA (Sinhala)
Ĉ (/C)	432	ĈINA (= Mandarena)
Ĉ <sup>h</sup> (/Ch)	9	ĈEHA
Ĉ <sup>v</sup> (/Cv)	1	ĈUVAŜA (Sovetunio)
Dk	1	DAJAKA (Borneo)
Dn	5	DANA
En	ant.	ENGLO-SAKSA
E /Eo	1	ESPERANTA
Et	1	ESTONA
E <sup>ŭ</sup> (/Eu)	ant.	EUROPA
Ev	1	EVEA (Okcidenta Afr.)
F <sup>n</sup> /Su	4	FINNA (= Suoma)
Fl	—	FLANDRA
F	70	FRANCA
Fu	6	FULANI (okcidenta Afr.)
Ge	—	GALEA

Gi	2	GALICA
Gl	ant.	GALLA (prafrancia)
Ga	3	GALAA (Etiopio)
Lg	2	GANDA (= Luganda; Suda Ugando)
G	120	GERMANA
Go	1	GONDA (Hindio)
Gr/nE	8	GREKA
Gz	20	GUZERATA (Hindio)
Gv	2	GVARANA (Paragvajo pliparte)
Gt	ant.	GOTA
Ĝ (/Gk)	ant.	ĜERMANA
Hk	19	HAKKA (Ĉinio)
Hs	13	HAUSA (Okc. kaj Centra Afr.)
Hb/nHb	ant./2	HEBREA
Hl/E	ant.	HELENA (komparu: Greka)
Hd	146	HINDA
Hn	—	HINDUSTANA
He	ant.	HINDO-EUROPA
H	139	HISPANA
Hg	12	HUNGARA
Ie	1	IBIBIO-EFIK (okc. Afr.)
Ib	4	IGBO (= Ibo) (okd. Afr.)
Ik	2	ILOKO (Filipinoj)
In	—	INDONEZIA (vd. Maleza)
Ir	—	IRLANDA
Is	—	ISLANDA
I	87	ITALA
J	95	JAPANA
Jv	42	JAVA
Jd	5?	JIDA (= germanhebrea)
Jb	4	JORUBA (okc. Afriko)
Kk	4	KAJZAKA (Sovetunio)
Kĝ (/Kg)	3	KAMBOĜA
Kn	19	KANARA (HINDIO)
K	43	KANTONA
Kv	1	KARTVELA (= Georga) (Sovetunio)
K <sup>ŝ</sup> (/Ks)	2	KAŜMIRA (Hindio)
Kt	5	KATALUNA
Kl	ant.	KELTA
Ml/Ke	31	KERALA (= Malajalama, vd)



Ka	3	KEHRUARI (Hindio)
Kê (/Kc)	6	KIĈUA (Sudameriko)
Ku	1	KIKUJU (= Gikujo) (Kenjo)
Kn	1	KIMBUNDU (= Ndongo, =Mbundu, Angolo)
Km	—	KIMRA
Kz	1	KIRGIZA (Sovetunio)
Ko	32	KOREA
Kr	—	KROATA (vd. Serbo-Kroata)
Kd	5	KURDA (Turkio, Irano, Irako; Sovetunio, Sirio)
Ls	1	LAOSA (Azio)
L	ant.	LATINA
La	2	LATVA
Ll/Na	1	LINGALA (vd. Ngala)
Li	3	LITOVA
Ld	2	LUGANDA (=Ganda) (Suda Ugando)
Md	6	MADURA (Indonezio)
Mn	1	MAKEDONA (Jugoslavio)
Mu	1	MAKUA (Sudorienta Afriko)
Ml/Ke	31	MALAJALAMA (= Kerala = Malabara)
M	69	MALEZA (=Malaja) (vd. Indoneza, Hindio)
Mg	4	MALGAŜA (Madagaskaro)
Mb	3	MALINKE-BAMBARA-DIULA (Okc. Afriko)
Ĉ (/C)	432	MANDARENA (= ĉhina)
Mr	31	MARATHI (Hindio)
Mi	36	MIN (Ĉinio)
Mv	1	MORDOVA (Sovetunio)
Ms	2	MOSSI (Orienta Afriko)
Nl	17	NEDERLANDA
Np	3	NEPALA
Na/Ll	1	NGALA (=Lingala) (Belga Kongo)
Nj	1	NJANĜA (Sudorienta Afriko)
Ng	4	NORVEGA
Oc	9	OKCITANA (=Provencala, lingvo de »oc«)
Or	14	ORIJĀ (Hindio)

Tg	8	TAGALA (Filipinoj)
Tj (/Tj)	1	TAĴIKI (Sovetunio)
Tm	34	TAMILA (Hindio, Cejlono)
Tt	3	TATARA de la Volgo (Sovetunio)
T	38	TELUGU (= Andhra) (Hindio)
Tb	7	TIBETA
Tl	1	TULU (Hindio)
Tk	23	TURKA
Tn	1	TURKOMANA (Sovetunio)
Tf	2	Tŭi-FANTE (Okcid. Afr.)
Ps	20	PERSA (Irano, Afganio, ...)
Pl	33	POLA
P	72	PORTUGALA
Pk	ant.	PRAKRITA
Oc	9	PROVENCALA (vd. Okcitana)
Pb	23	PUNĜABA (Hindio, Pakistano)
Rs	16	RAJASTHANI (Hindio)
Rê (/Rc)	—	ROMANĈA (Svisio)
Rk	ant.	ROMANIKA
Ra	6	RUANDA (= Kiruanda) (Sudcentra Afr.)
Rn	17	RUMANA
Rd	2	RUNDI (=Kirundi) (Sudcentra Afr.)
R	153	RUSA
S	ant.	SANSKRITA
Sb	—	SERBA
S-K/Sb-Kr	16	SERBA-KROATA
Sm	19	SIAMA
Si	5	SINDHI (Hindio, Pakistano)
Sa /Cl	7	SINHALA (=Cejlono)
St	—	SKOTA
Sk	3	SLOVAKA
Sn	2	SLOVENA
Sl	3	SOMALA (Orienta Afr.)
So (nSo)	1	SOTHO (=Suto = Sesotho = Sesuto)
So (sSo)	1	SOTHO (ktp) SUDA
Sh	10	SUAHILA (Orienta Afr.)
Sd	13	SUNDA (Indonezio)
Fn/Su	4	SUOMA (= Finna)
Sv	9	SVEDA



Ug	3	UIGHUR (nordokc. Ĉinio)
Uk	40	UKRAJNA (= Rutena)
Ub	2	UMBUNDU (= Mbundu) (Angolo)
U	50	URDUA (Pakistano)
Uz	7	UZBEGA
ŭu/W	39	ŭu (Ĉinio)
V	ant.	VEDA
Vk	—	VASKA (= Baska)
Vs	8	VISAJA (Filipinoj)
Xh	3	XHOSA (Suda Afr.)
Zl	3	ZULUA (Suda Afr.)

## PRILNGVAJ DISKUTOJ

406:408.92

## FINAJO DE PREDIKATIVA ADJEKTIVO

(R. Linse, Jynköping, Svedujo)

Plena Gramatiko § 297.

»La predikativo povas akcepti diversajn formojn:

a) adjektivo. Tio estas la plej ordinara kazo. La predikativa adjektivo akordiĝas nombre kaj kaze kun la subjekto — — — RIM. I. Kiam la subjekto estas infinitivo aŭ propozicio, aŭ tute ne ekzistas (§292. 2.), la adjektiva predikativo alprenas la adverban-neŭtran finaĵon -e (vd. §. 196. RIM.) — — —«

Plena Gramatiko § 196 (3a eldono § 68).

»La kvalifika adjektivo finiĝas en Esp-o ĉiam per —a. — — — RIM. Tamen, en frazoj, kiel »rajdi surleono estas danĝere« ni trovas kvazaŭ neŭtran formon de adjektivo; ke tiu neŭtra formo koincidas kun la adverba, tion klarigas nur influo de la rusa lingvo, en kiu la neŭtra adjektivo rolas ankaŭ kiel adverbos».

Estas rimarkinda, ke laŭ la Plena Gramatiko la predikativa adjektivo, kiam la subjekto estas infinitivo aŭ propozicio, aŭ tute ne ekzistas, anstataŭ la adjektivan finaĵon —a devus alpreni la adverban - neŭtran - finaĵon -e (§297) aŭ neŭtran formon koincidantan kun la adverba (§ 196 RIM). Tio signifas, ke la finaĵo —e povus ludi rolon ne nur kiel adverba finaĵo sed ankaŭ kiel adjektiva finaĵo. Sed tia duobla rolo de la finaĵo —e ne estas konforma al la fundamenta gramatiko.